

Christian Morgenstern,

[Kiel vi]

*tradukita de Willy Nüesch*

Kiel vi, dum matenas,  
sunbrilon prunteprenas  
kaj lumas preskaŭ kiel ĝi?  
Kaj kiam hor' preteris,  
jam ĉio malaperis,  
kaj grizas nokt' en vi!

La bonon vi forgesis,  
kiu en vi progresis,  
grumblul' rigardas vi sen ĝoj'  
el de la eta via  
senfine teda via  
al via vivovoj'.

Tenu la ĝojon, koro,  
pri l' matensuna oro,  
farint' de tia tagplezur',  
altsuper penso morna,  
angor', severo dorna  
do ĝis la noktobskur'!

...

*Traduko de la Germana poemo “Wie kannst du nur am Morgen...” de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-195-389 (2013-08-28 18:49:58)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo “Fonto” n-ro 274 en Oktobro 2003.*